

Walther Kabel

# La stelistino



# Enhavo

[Antaŭnoto](#)

[La ŝtelistino](#)

[Glosaro](#)

[Kolofono](#)

Walther Kabel

**La stelistino**

---

## ANTAŬNOTO

---

La sekva rakonto estiĝis iam antaŭ la Unua Mondmilito en Germanio. Tial vi konatiĝos kun diversaj esprimoj kaj titoloj, kiuj ne estas kutimaj. Tio estas ekzemple la rangoj de la krimpolico, do *komisaroj*. En aliaj landoj kaj lingvoj vi havas *inspektorojn* aŭ laŭ la Gugla tradukilo (Google Translator) *detektivajn inspektorojn* en tiu rolo ... se oni tradukas la rangojn.

Ĉiujn aliajn rangojn kaj titolojn mi klarigas en la glosaro.

Vi trovos la jenan frazon en la rakonto: ... *ŝi metis sian brakon sur la mansakon kuŝantan apud ŝi*

Jes, *mansakon kuŝantan apud ŝi*, **ne**: *mansakon kuŝantan apud si*. Jen klarigo por tiuj, kiuj ne kredas min: *mansako* estas objekto de la ĉefa frazo kaj laŭsenca subjekto de subfrazo. La plena, senparticipa frazo tekstas: *Ŝi metis sian brakon sur la mansakon, kiu kuŝis apud ŝi*. La participo mallongigas tiun frazon, kaj la gramatikaj rilatoj restas samaj (mansakon, kiu kuŝis apud ŝi → mansakon kuŝantan apud ŝi).

La tradukinto

---

## LA ŜTELISTINO

---

Kiam la ordinara vagonaro de Halle al Berlin eniris en la grandan krucigan fervojan stacion Bitterfeld je la dek-unua horo antaŭtagmeze, tiam el kupeo de la tria klaso facilmove saltis malgranda dikventrulo. Oraj okulvitroj kaj kuspa nazo donis al la glate razita, multfalta vizaĝo naivan, plaĉan trajton. Tiu vojaĝanto tre simila al vilaĝa lernejestro paŝetis laŭ la vagonaro kaj subite haltis antaŭ duaklasa kupeo kaj tre trankvile bruligis cigaron. Tutcerte li povis fari tion nur sur ĉi tiu loko de la vasta pasaĝerkajo, ĉar tiu ago estas tre grava por ĉiu pasia fumiganto. Ĉiu akra observanto bone komprenus tiun strangan konduton de la malgrandulo. Sed en la vigla svarmado de la fervoja stacio neniu atentis la dikulon kun afable brilantaj okuloj malantaŭ okulvitroj, kaj same neniu vidis, ke li kaj juna, elegante vestita viro, kiu staris en la fenestro de la duaklasa kupeo, fulmrapide interokulumis.

Kiam la cigaro brulis, la modesta vojaĝanto vagis al la stacidomo kaj malaperis tra la pordo al la atendejo, blovante kun plej granda plezuro la bluecan fumon en la klaran aŭtunan aeron. Tuj poste ankaŭ la alia sinjoro, kiu estis okuluminta kun li, elvagoniĝis kaj eniris la stacidoman restoracion, kie li sidiĝis kvazaŭ sen intenco ĉe la sama tablo, kie la malgranda viro kun la okulvitroj jam sidis ĉe glaso da biero.

»La trajno al Berlin ĉi tie haltas dek du minutojn, ĉu ne?«, diris la lasta veninto al sia samtablano post kelka tempo tre ĝentile, kiel oni petas informon de tute nekonata persono. Tiu sensignifa demando estis la enkonduko de interparolo, kiun faris ambaŭ viroj per prudenta flustra tono. Tamen la impresoj ŝajnis, ke la viroj nur ĵus konatiĝis kaj hazarde babilas.

»Kio estas, Winter?«, komencis la interparolon la pli juna el la viroj. Lia blonda, tordita lipobarbo en freŝa, akre cizelita vizaĝo kaj streĉita sinteno montris oficiron en civila vestaĵo. »Vi urĝis min al interparolo. Ĉu vi malkovris ion gravan?«

»Mi esperas, sinjoro komisaro<sup>1</sup>.«

»Do ek, Winter! Parolu! Ne restas multe da tempo al ni.«

»En Halle mi elektis malplenan kupeon por nefumantoj, ĉar mi volis iomete dormi. Lastmomente antaŭ la ekveturo eniris juna damo portanta malmultekostan, flavan valizon en la mano. La konduto de mia kunvojaĝantino ŝajnis al mi suspekta. Ŝi premis sin timeme en angulon kaj fermis la kurtenon per tremaj, hastaj kaptoj tiom, ke ŝi ne estis videbla de la kajo. Sian valizon ŝi tenis en la sino, premante ĝin



kvazaŭ valoraĵon al si. Kiam la trajno ekveturis, ŝi sentimigite spiris facile kaj moviĝis libere. Sed ŝiaj rigardoj, per kiuj ŝi kaŝe esploris min, estis strange evitemaj. Tial mi diris al mi, ke tiu persono ne povas havi tute puran konsciencan. – Mi volas raporti pli koncize. – Mia ruzo de la ŝajna dormado havis sukceson tuj malantaŭ la stacio de Roitsch. Ni, la juna damo kaj mi, ankoraŭ estis la solaj pasaĝeroj de la kupeo, kaj mia kunvojaĝantino sendube konvinkiĝis, ke miaj sonoj de ronkado estas aŭtentikaj. Ŝi subite komencis singarde malplenigi sian valizon sur la benkon. Kvankam ŝi turnis la dorson al mi, malbutonumis sian nigran drapojakon kaj etendis ĝin al ambaŭ flankoj kiel ŝirmilon kontraŭ scivolaj rigardoj, mi sukcesis kaŝe observi kaj aŭdi ion kaj tion. En la valizo troviĝis entute dek du malgrandaj, valoraj objektoj volvitaj en papero. Tion mi konstatis laŭ la ĉifado de la papero dum malpakado. Mi konkludis, ke ili estas valoraĵoj, ĉar mi ofte aŭdis delikatan tintadon de pecoj de valormetalo kaj same ofte rimarkis sur la plafono de la kupeo strangajn lumreflektojn, kiuj estiĝis de la sunradioj trafalintaj tra la fenestro kaj trafantaj poluritan oron aŭ tranĉitajn gemojn. Laŭ miaj observoj estas ebleco, ke ŝi estas membro de la bando de ŝtelistoj, kiuj agadas en internaciaj koridoraj<sup>2</sup> kaj ekspresaj trajnoj, kaj kiujn ni vane serĉis ĝis nun. Tion vi devas konsenti, sinjoro komisaro, precipe konsiderante la strange timigitan konduton de la persono, kiu cetere havas tre simpatian vizaĝon!«

Krimpolica komisaro Fritz Reinbach penseme rigardis en la aeron.

»Estas tre bone, Winter ... Sed ĉu vi vere pensas, ke profesia krimulino estas sufiĉe senzorga kaj inspektas siajn ŝtelitajn varojn en ĉeesto de nekonata tria persono?«, li diris malrapide.

La oficisto levis la ŝultrojn.

»Ĉiu fripono faras stultaĵon, tion ni scias proprasperte! Kaj se miaj oreloj ne trompis min, ne temis pri inspektado, sed pri ordigo de la valoraĵoj. Almenaŭ ŝajnis al mi, ke la juna damo ĉiam kunmetis kelkajn el la pecoj en ujon, dum antaŭe la objektoj estis individue volvitaj en papero. Nun ĉio bone kuŝas en la flava leda valizo, kies enhavon mi tre ŝatas detale ekzameni en Berlin!«

»Ĉu la persono veturas al Berlin?«

»Certe ŝi havas bileton por alveni tien. Tion konstatis la kondukto tute diskrete laŭ mia taskigo. Kaj mi zorgos, ke ŝi intertempe ne fuĝos. Nuntempe ŝi ankoraŭ estas kvieta en sia kupeo, kiun mi povas observadi tra la fenestro de mia ĉi-tiea sidloko.«

Kiam la trajno denove ekmoviĝis post kelkaj minutoj, du pliaj personoj estis aliĝintaj al la pasaĝeroj de kupeo 3, en kiu la krimpolicano Winter estis farinta tiujn interesajn malkovrojn. En la angulo kontraŭe de la seĝo de la juna damo sidis Fritz

Reinbach, kiu, kiel estis interkonsentite, ŝajnis ne koni sian subulon. Simple vestita maljunulino sidis sur la alia benko apud Winter.

La komisaro formis kun la policano unun el tiuj multnombraj krimpolicaĵaj patroloj, kiuj ekde monatoj serĉadis en la trajnoj bandon de aŭdacaj kaj lertaj ŝtelistoj. En la lastaj tagoj ili malkovris klarajn signojn, ke la sidejo de la sendube plurpersona friponaro estis serĉenda en Berlin, kaj li nun volis fari siajn pluajn esplorojn de tie. Nun sidante en la angulo ĉe sia fenestro kaj ŝajne absorbita de la enhavo de sia gazeto, li trovis okazon por nerimarkite ekzameni la aspekton de sia vid-al-vidulino. »Winter pravis«, Reinbach diris al si post plia rapida rigardo al la vizaĝo de la juna damo. »Ne malbela vizaĝo. Ĉi tiuj du trajtoj ĉirkaŭ la bele desegnita buŝo neniel markas friponon. Kaj tiu frunto – preskaŭ noble formita, sama estas la mentono! – Mi timas, ke Winter estas sur la malĝusta vojo ĉi-okaze. Profesia ŝtelistino neniel aspektas tiel senartefike eleganta malgraŭ la simpla vestaro kaj malgraŭ la timema konduto.«

La trajno bruetis tra la aŭtuna pejzaĝo. En la jam hejtita kupeo pro la tute fermitaj fenestroj iom post iom disvolviĝis temperaturo, kiu pli kaj pli tedis la komisaron.

»Ĉu vi permesas, ke mi malfermas la fenestron iomete? La varmego ĉi tie estas almenaŭ por mi neeltenebla«, li diris kun mallonga riverenco al la juna damo, kiu ĝis nun fikse rigardis tra la fenestro la ŝanĝiĝantan panoramon de la pejzaĝon. En la fervojaj stacioj ŝi regule returnis sian kapon kaj provis kaŝi sin malantaŭ la verda kurteno.

Ĉi tiu demando, kiu ne estis farita per tro laŭta tono, igis, ke la opinio de Fritz Reinbach pri la mistere singarda kaj timigita kunvojaĝantino ŝanĝiĝis, kio estis sufiĉe malavantaĝa por ŝi. Ĉiu guto de sango elfluis el ŝia vizaĝo pro la sono de lia voĉo, kaj ŝi rigardis la krimpolican komisaron el okuloj larĝaj pro timo, tute konsternite, dum per nevola movo ŝi ŝirme metis sian brakon sur la mansakon kuŝantan apud ŝi.

Winter, kiu atente sekvis tiun okulfrapan okazaĵon de sia sidloko, nun tuisis.

Kaj nur ĉi tiu tusado ŝajnis rekonscii la junan damon. Evidente uzante sian tutan energion, ŝi devigis sin trankviliĝi kaj premvoĉe diris: »Kion Vi deziras, sinjoro...?«

»Mi nur demandis, ĉu mi rajtas iomete malfermi la fenestron – jen ĉio!«, diris Reinbach malrapide, emfazante la lastajn vortojn.

»Bonvolu fari«, estis la respondo donita en stato de plej granda konfuzo. Kaj denove la fremdulino rigardis per ĉiuj fortoj tra la fenestro, sed nun ŝia vizaĝo estis ruĝa pro interna ekscito.

Sed la komisaro pensis: »Mi plu observos vin tre atente, mia infano, malgraŭ via malĝoja mieno kaj la ĉarmaj grizaj okuloj. En Berlin vi devos malkaŝi viajn sekretojn. Jen mia promeso!«

---

Baldaŭ post la alveno de la ordinara trajno Halle-Berlin fraŭlino kun flava leda valizo en la mano eniris lombardejon en Potsdamerstraße kaj proponis al la posedanto diversajn malnovajn juvelojn por monigi. Ĉar ŝi povis sufiĉe identigi sin, oni prenis ŝiajn juvelojn – antikvan brilantan ringon, grandan oran broĉon kun valora gemo kaj pezan brakringon el oraj platoj – sen pliaj demandoj, kaj pagis al ŝi altan monsumon.

Post tio ŝi forlasis la butikon por sinsekve viziti tri aliajn proksimajn lombardejojn, kie ŝi ankaŭ vendis diversajn aliajn juvelojn. Poste ŝi prenis aŭtobuson al la stacidomo *Anhalter Bahnhof*, eliris ĉe la finstacio de la itinero kaj malaperis en la stacidomon – sen rimarki, ke la du krimpolicianoj konstante sekvis ŝin kiel bonaj sangohundoj kaj tial ankaŭ sciis pri ŝiaj vizitoj al la lombardistoj. Ĝuste kiam ŝi aĉetis bileton ĉe la giĉeto por la koridora trajno ekironta je la sesa horo al Halle, Fritz Reinbach staris en ŝia vojo kaj deklaris, ke ŝi estas arestata. Ŝi memvole sekvu lin al fiakro por eviti nenecesan atenton. Ŝanceliĝante kaj kontraŭbatalante la larmojn, ŝi obeis kun vizaĝo pala kiel morto sen diri eĉ nur unu vorton al la policianoj sidantaj kontraŭ ŝi en la veturilo.

Alveninte en la enketa ĉambro de la polica prezidiejo sur Alexanderplatz, la granda kaj konata placo en la mezo de Berlin, ŝi demandis la komisaron per tre trankvila voĉo, ĉu ŝi povas paroli kun li sola sen atestantoj. Ŝi volis konfidi sin nur al li pro certaj kaŭzoj.

---

La rentulo Felix Hornemann, loĝanta en la urbo Halle, Georgenstraße 15, estis unu el tiuj bonfaraj homoj, kiuj konstante reklamis en la gazetoj, ke ili donos al iu ajn monserĉanto pruntojn de ajna kvanto kontraŭ sufiĉa sekureco. Ke tia bonfarado ĉiam donas interezon ĝis dudek kvin procentoj kaj pli, estas bone konate de sennombraj procesoj kontraŭ uzuristoj kiel averto al ĉiuj, kiuj trovas sin en momento de embaraso. Tamen ekzistas ankoraŭ sufiĉe da senzorgaj homoj, kiuj serĉas la helpon de tiuj hienoj, eĉ tiom da, ke tiuj konataj »bonfarantoj de la homaro« plejparte havas tre komfortan kaj enspezigan ekzistadon per sia malluma negoco malgraŭ unuopaj perdoj.

Ekde multaj jaroj inter la klientoj de sinjoro Hornemann estis korporaciaj<sup>3</sup> studentoj, junaj advokatoj kaj unujaruloj<sup>4</sup>, ĉe kiuj la monaj cirkonstancoj de la gepatroj faris la establilon de komercaj rilatoj profitodona. Pro certaj cirkonstancoj



Felix Hornemann neniam negocis kun oficiroj. Estis iuj malagrablaj regimentestroj, kiuj sen hezito enmiksiĝis sin en la privatajn aferojn de siaj leŭtenantoj kaj tuj minacis per la prokuroro, eĉ se temis pri nur mizeraj dek-du- ĝis dek-kvin-procenta interezo – sen kalkuli la finan procentaĵon de dekono de la pruntaĵo, kiun la bonfaranto el Georgenstrasse ĉiam dekalkulis por si.

Estis la tago post la aresto de la fraŭlino kun flava valizo. Ĉirkaŭ tagmezo en la kontoro de Hornemann sidis sur ruĝe remburita seĝo sinjoro kun torditaj blondaj lipharoj, kiu faris la impreson de oficiro en civilaj vestaĵoj.

»Vi do deziras kvincent markojn, sinjoro asesoro<sup>5</sup>?«, ĵus demandis la bonkora rentulo, dum li denove taksis la aspekton de la nova, ĝis nun tute nekonata kliento per supraĵa rigardo. Ĉi tiu ekzameno havis bonan rezulton favore al la blonda sinjoro. Ĉar Hoĉjo, kiel oni nomis lin en la rondoj de la konfidatoj, frotis siajn manojn kun bonvola rideto kaj poste faris kuraĝigan kapmovon al la kontraŭe sidanta persono.

»Efektive – mi bezonas kvincent markojn por tri monatoj.«

»Bone – bone – hm, ĉu mi rajtas demandi, kiu rekomendis min al vi? Tio interesas min!«

»Referendario<sup>6</sup> von Köhler, se vi nepre volas scii!«

Je la nomo de Köhler la vizaĝo de Hoĉjo, kiu ĵus estis tiel afabla, subite fariĝis glacia, malvarma kaj ŝtona.

»Do, la sinjoro referendario!«, li diris malrapide.

»La nomo de mia konato ŝajnas elvoki en vi tre malagrablajn sentojn, sinjoro Hornemann«, diris la asesoro kun ironia sincereco. »La ŝanĝo en via esprimo igas min pensi tion.«

»Vi ĝuste divenis, sinjoro asesoro«, respondis la alia post iom da hezitado. »Verŝajne mi perdos multe da mono pro tiu sinjoro von Köhler.«

»Ho, kion vi diras!« La asesoro eksaltis kun evidenta moko. »Verŝajne ne estos tro granda perdo. Ĉar laŭ mia scio, vi donis al Köhler nur pruntaĵon de okcent markoj por kvitigi vetludajn ŝuldojn antaŭ du jaroj. Ĉu vere li ankoraŭ ne repagis ĉi tiun sumon?«

Sinjoro Hornemann subite ekmoviĝis tre malkviete sur sia seĝo. Li pli kaj pli suspektemis pri la konduto de ĉi tiu ŝercema sinjoro. Estis io kaŝite en la afero. Ne estas dubo, ke aliaj intencoj venigis la asesoron ĉi tien – sed kiuj, kiuj...?

»Bonvolu, ĉu vi ne volas respondi al mi...!«, demandis la stranga homo per preskaŭ bruska tono. »Kio estas sciigenda pri la ŝuldoj de Köhler, parolu!«

»Sinjoro, ĉu tio iel koncernas vin?«, fine diris Hornemann kun peno kaj leviĝis kiel incitita tigro. »Mi rezignas...«

Kion li volis rezigni, restis nedirata. La supozata asesoro akre interrompis lin: »Residiĝu! Nun mi scias, kiaspeca vi estas. Sed por ke ankaŭ vi sciu, kiu estas mi – jen mia legitimilo. Mi estas krimpolica komisaro Fritz Reinbach el Berlin. – Kaj nun mi rakontos al vi mallongan historion. La vera celo de mia alveturo estos diskutata poste. – Hieraŭ junulino estis arestata en Berlin pro suspekto, ke ŝi kontraŭleĝe akiris juvelaĵojn, kiujn ŝi lombardis en diversaj lombardejoj. En la polica prezidiejo la koncerna sinjorino, fraŭlino Vera von Köhler – mi emfazas: Vera von Köhler – tiam donis al mi jenajn informojn. Ŝia frato, kiu estas referendumo kaj oficiro de rezervo, antaŭ du jaroj prenis okcent markojn kontraŭambio ĉe loka uzuristo – tiu estas vi, sinjoro Hornemann, sidu kviete! – Do li prenis okcent markojn de uzuristo kontraŭambio, sed ankoraŭ ne povis repagi la sumon, ĉar lia patro, la Geheimrat<sup>7</sup> von Köhler, suferis severan apopleksion tre baldaŭ, post kiam la prunto estis prenita, kaj tial devis pensiigi. Pro tio la multnombra familio de la ĝis tiam tre energia sinjoro falis en tre malfacilan monan situacion. Heinz von Koehler do devis daŭre peti vin plilongigi la kambion, kion vi komence faris volonte, ĝis iun tagon vi deklaris, ke vi ne plu volas permesi al li pagoprokraston. La pagenda sumo intertempe atingis mil sescent markojn. Vi minacis turni vin al lia patro, kiu pro sia kadukiĝo povus morti pro tiu novaĵo. En sia timo Heinz von Koehler skribis al vi dokumenton, en kiu li kiel la plej aĝa infano en la familio promesis al vi la juvelaĵojn de la familio Koehler kiel garantiado kun la konsento de siaj gefratoj. Vi uzis ĉi tiun paperon, kiu kiel dispono pri heredotaĵoj estas en si mem senvalora, en artifika maniero kontraŭ la junulo. Komence vi devigis lin pagi grandegan interezon por la plua plilongigo. Se via viktimo ne estis tuj pagipova, vi regule diris, ke vi faros plendon al la tribunalo kaj tie prezentos la lombardan akton, kiun Heinz von Koehler bedaŭrinde tiel haste estis vortuminta, ke sub certaj cirkonstancoj oni povas akuzi lin pri provo de fraŭdo. Nun, kiam la kambia ŝuldo kun la ŝuldata interezo kreskis ĝis du mil kvarcent kvindek markoj, vi nun provis ĉesigi la kruelan ludon en maniero sufiĉe profita por vi, postulante unue la du mil kvarcent kvindek markojn kaj poste pliajn ducent kvindek markojn por la livero de la fatala lombarda akto. Ĉiuj petoj de Heinz von Köhler estis vanaj. Vi prokrastis la pagon ĝis hodiaŭa tagmezo. Se la mono ĝis tiam ne estos pagita – entute du mil sepcent markoj – vi volis neeviteble submeti la aferon al advokato por plua procesigo. Tiu paŝo, pri tio atentigis vin via kompatinda viktimo plurfoje, sekvigis eble la maldungon de la referendumo, ties civiligon kiel rezerva oficiro kaj per tio la certan morton de la grave malsana Geheimrat. Ĉar ne estis alia rapida elturniĝo el tiu kriza situacio, fraŭlino Vera von Köhler decidis laŭ peto de sia frato sekrete lombardi en Berlin la familiajn juvelaĵojn, kiujn ŝia patro

konservis ŝlosite en skatolo en sia skribotablo. En la tumulto de la grandega urbo ŝi volis eviti la malkovron de ĉi tiu humiliga paŝo kaj la malhonorigon de sia respektita nomo. Vi apenaŭ imagas, kiajn afliktojn havis la kompatindaj gefratoj pro tiu situacio! Fraŭlino von Köhler esperis, ke la Geheimrat ne rimarkos la mankon de la antikvaj valorajoj kaj ke ŝi kaj ŝia frato intertempe sukcesos kolekti sufiĉe da mono de parencoj kaj konatoj por elaĉeti la objektojn. Sed tio estis nura espero, kaj esperoj facile trompas, sinjoro Hornemann, kiel vi ankoraŭ hodiaŭ rimarkos je via propra bedaŭro koncerne al la du mil sepcent markoj. La juna damo, kiu estas dungita kiel akompantino ĉi tie ĉe maljuna grafino kaj tial povis fari unutagan vojaĝon al Berlin sen ke ŝiaj gepatroj eksciis tion, forveturis per la matena trajno el la urbo Halle. La referendumo ne povis mem plenumi tiun embarasan aferon, ĉar li loĝas en la domo de la gepatroj. Lia fratino tamen estis konstante turmentata de la timo, ke ŝi eble renkontos unun el siaj multnombraj konatoj survoje, kiuj eble demandus ŝin pri la celo de la vojaĝo. Tiu montriĝis vera martiriĝo por fraŭlino von Köhler. Tute timigite, nerve premate de la ekscito de la lastaj tagoj, nur malfacile trankviligante la ĉiam pli laŭtan voĉon en si, kiu diris, ke ŝi faras maljuston per la sekreta lombardo de la familiaj juvelaĵoj – tiel ŝi sidis duone rompita en sia kupeo, rigardante kun maltrankvilo ĉiun homan vizaĝon, kiu renkontis ŝiajn okulojn. Sed ankaŭ ĉi tie, kiel ofte, la providenco intervenis por ĝustigi la malhelan destinon de homo. Pensante, ke ŝia sola kunpasaĝero profunde dormas, fraŭlino von Köhler metis en sia kupeo la diversajn juvelaĵojn en kvar unuopajn pakaĵojn, ĉar laŭ la interkonsento, kiun ŝi estis farinta kun sia frato, ŝi ne donos ĉiujn objektojn en unu lombardejon por gajni monon, sed iros al kvar malsamaj lombardejoj por ne vekti suspekton. Mi jam menciis, ke poste la sinjorino estis arestata pro suspekto pri ŝtelo – bonŝance por ŝi, mi povas diri.

Mi tiel detale priskribis la spertojn de fraŭlino von Koehler al vi, sinjoro Hornemann, por montri al vi tute klare, kian malfeliĉon vi kaj via speco alportas al tutaj familioj. Tiel vi kondukas eĉ la plej noblajn personojn for de la ĝusta vojo kaj metas senkulpajn estulojn en plej hontigajn, plej malhonorigajn situaciojn. Bonvolu, lasu min finparoli!«, la komisaro interrompis la provon de la uzuristo defendi sin. »Ĉi tie nur mi rajtas paroli, kaj vi devas silenti kaj obei. Aliokaze tre facile povas okazi, ke vi hodiaŭ devos manĝi vian tagmanĝon inter la grizaj muroj de la arestejo!

Mi pagos al vi mil markojn ĉi tie. La papera mono estas malfalsa, vere malfalsa. Reciproke vi transdonos al mi la kambion kaj la lombardan akton. Ĉu vi ne volas? Ankaŭ bone! Via propra damaĝo!«

La komisaro ekstaris: »Vi eble scias, ke krimpolicianoj rajtas en kriza okazo fari arestadon eĉ sen laŭregula arestordono. Mi nun uzos ĉi tiun rajton, ĉar Heinz von

Koehler nomis ne malpli ol dek du sinjorojn el siaj konatoj, kiujn vi elpremis kiel lin. Por ne doni al vi la ŝancon forigi iujn ajn kulpigajn paperojn kaj notojn, mi faros...« Sed Fritz Reinbach ne bezonis esti pli klara. Hoĉjo transdonis la paperojn al la komisaro kun obstina kolero.

»Do – virto venkas!«, la komisaro diris ironie kaj post mallonga inspektado ŝovis la paĝojn en sian poŝon. »Ankoraŭ unu averto antaŭ ol ni disiĝos, sinjoro Hornemann: Se eĉ unu vorto el la enhavo de nia hodiaŭa konversacio eliĝas el via buŝo, nenio savos vin de akuzo pro uzuro, ĉar ekzistas ankoraŭ sufiĉe da kulpigaj paperoj kontraŭ vi. Same vi kompreneble ne plu aŭdacos fari pruntonegocojn, kiuj sufokas viajn klientojn! Mi zorgos, ke la ĉi tiea polico daŭrigos la observadon de viaj negocoj.«

Ĉe la apuda stratangulo li renkontis Heinz kaj Vera von Köhler, kiuj dankis lin pro ĉi tiu feliĉa solvo de ĉiuj malfacilaĵoj. Ja estis li, kiu je la antaŭa tago post ŝia konfeso en la Berlina polica prezidiejo igis Vera-n, ke ŝi tuj elaĉetis la lombarditajn juvelaĵojn kaj poste reveturis kun li al Halle per la nokta eksprestrajno.

---

Post duonjaro, en mirinde milda tago de Majo, Vera von Köhler kaj Fritz Reinbach iris brak-en-brake laŭ la Saale-promenejo, estante feliĉa geedza paro. Kaj ĝuste kiam eksprestrajno tondris sur la fervoja ponto en la malproksimon, la komisaro brakumis sian amatinon forte kaj ridetante flustris al ŝi: »Mi arestis vin unu fojon kiel ŝteliston, karulino – ĉu vi memoras? – Kaj vi vere estis malgranda, kara ŝtelistino – ĉar vi ŝtelis mian koron, mian koron por ĉiam!«

---

## GLOSARO

---

1. komisaro – Rango de la germana krimpolico simile al inspektoro aŭ detektiva inspektoro en aliaj landoj. ↔
2. koridora trajno – Trajno de specialaj vagonoj, kiuj havas transirejojn ŝirmitajn de intervagonaj balgoj kaj flankan koridoron por la kupeoj (ekde 1892 en Germanio). ↔
3. korporacio – Unuiĝo, gildo, samcela grupo de studentoj. ↔
4. unujarulo – Volontula soldato, kiu pro sia lerneja klerigado servas nur unu jaron. ↔
5. asesoro – Rango kaj titolo de juristo trapasinta la duan ŝtatan ekzamenon en Germanio. ↔
6. referendario – Titolo de estonta juristo trapasinta la unuan ŝtatan ekzamenon kaj trapasonta la duan. ↔
7. Geheimrat – ›sekreta‹ (laŭ la senco: ›konfidinda‹) konsilisto. Altranga oficisto komparebla al hodiaŭa ministro. ↔

---

# KOLOFONO

---

**Titolo**

La ŝtelistino

**Originala titolo**

Die Diebin

**Aŭtoro**

Walther Kabel (1878 - 1935)

**Traduko**

Michael Lennartz

**Titolbildo**

Timo Paddel. La bildo, prenita de bildkarto, montras la tiutempan (ĉirkaŭ 1900) stacidomon de Halle ĉe Saale.

**Eldono**

Unua eldono (novembro 2022)

**Danko**

Mi dankas la sinjorojn Bernhard Pabst kaj Klaus Friese por iliaj korektado kaj altvaloraj lingvaj rimarkoj. *ML*